

8000–9999 paŝoj – 2 baladoj

& Morta princino kaj sep herooj: 466

& Sekretaj sonetoj: 480

& Morta princino kaj sep herooj:

< Per melodioj #Harpa rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 8525 paŝoj dum 1 horo kaj 24 minutoj, kaj #Nova rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 6325 paŝoj dum 1 horo kaj 6 minutoj. Rimfabelon ruse verkis Aleksandro Puŝkin (1830). Tradukis Ivan Lubjanovskij. Baladigis, komponis kaj novan rekantaĵon aldonis Martin Strid (2015). Alternative eblas uzi melodion kaj rekantaĵon de Harpa rimaĵo (Hørpu ríma).>

(#Melodioj:

((#Harpa: <1,7:31> /La La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; LaLa LaTi doTi LaTi; do Ti La a; La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; Mi LaLa LaLa LaTi; do Ti La a)

?

(#Nova: <1,6:23> /so so soso fami soso; mimi mi mi redo mimi;
(#Rekantaĵo: soso soso laso fami; remi fafa faso fami; redo mimi rere do do)))×275)+

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1 (& Harpa rimaĵo:

Car' edzinon kisis laste

(×:; – **vin invitas kuri** – ;)

Kaj forrajdis senprokraste.

(×:; **Sorĉistoj, ; Estu ĉe l' junulino, ; vin invitas kuri, ; ilin akceptu zorge, ; sorĉistoj!**)) ?

(&Nova:

Car' edzinon kisis laste ; Kaj forrajdis senprokraste.

(×: **La spegulo veron diras, ; ŝin ĵaluzan ĝi inspiras, ; la spegulo veron diras.**))

'2 Tra fenestro al la voj' ; Ŝi rigardis en malĝoj'.

'3 De maten' ĝis sunsubiro ; Atendante en sopiro

'4 Karan edzon. Pro la streĉ' ; La okuloj larmas eĉ,

'5 Sed ne venas la amato. ; Nur sur la ebena plata

'6 (Blovas neĝa turnovent', ;)×

.....

'7 Naŭ monatoj jam forfluas, ;
Ĉe fenestro ŝi enuas,

'8 Kaj en nokto de Novjar' ; Ŝi
filinon naskis. Car'

'9 En la sama nokt' revenis, ;
Li, pri kiu koro ĝemis,

'10 Frumatene je la fest' ; Li
revenis post forest'.

'11 Kiam li al ŝi aliris, ; Ŝi,
vidante lin, ekspiris

'12 Kaj pro forto de l' impres' ;
Ŝi formortis antaŭ mes'.

,& Dua parto:

'13 Car sopiris sen konsolo ;
Sed ja tedas viv' en solo;

'14 Kiel songo pasis jar', ;
Reedziĝis nia car'.

'15 Diri veron, junedzino ;
Estis vere ja carino:

'16 Bela, svelta je statur' ; Kaj
prudenta, estis nur

'17 Ŝi fiera kaj kaprica, ; Tre
ĵaluza kaj malica.

'18 Servis ŝin por tualet' ; Ŝia
doto – spegulet',

'19 Multekosta, bela, krome ;
Ĝi paroli povis home.

'20 La carino kun ĝi nur ;
Babiladis kun plezur',

'21 Ŝi rigardis ĝin konstante ;
Kaj demandis koketante:

'22 "Diru, hela, ĉu laŭ ver' ;
Estas mi sur tuta ter'

'23 La plej bela, plej impoza, ;
Pleje blanka, pleje roza",

'24 La carino en la gaj' ;
Fingroklakas, ridas kaj,

'25 Koketante per okuloj, ; Sin
admiras en spegulo

'26 Kaj kun bela sinbalanc' ;
Rondas ŝi en flua danc'.

,& Tria parto:

'27 Sed filin' de l' car' ermite ;
Kreskis, kaj nerimarkite

'28 Ŝi disfloris kiel roz' ; Kun
ĉarmec' sen ia poz';

'29 Brovoj nigraj, buŝ' korala,
; Koro milda kaj morala;

'30 Ŝi jam estis fianĉin' – ;
Princ' Elizo svatis ŝin,

'31 Kaj la patro-car' konsentis,
; Kiel doton li prezentis

'32 dudek urbojn al la princ' ;
Cent bienojn en provinc'.

'33 Antaŭ la edziĝofest' ;
Caredzin' en luksa vest'

'34 En spegulo sin admiras ;
Kaj al ĝi denove diras:

'35 "Nu, spegulo mia hela, ;
Ĉu mi estas la plej bela,

'36 La plej blanka sur la ter'?"
; La spegulo: "Vi laŭ ver'

'37 Estas bela ja sen manko, ;
Sed plej bela kaj plej blanka
.....

'38 Estas tamen la princin'" . ;
Jen desaltis la carin',

'39 Per la dentoj akraj skrapis;
Per la man' spegulon frapis;
.....

'40 "Abomena mensogul'! – ;
Krias ŝi al la spegul',

'41 Ĉu ŝi povas min egali? ;
Ĉu ŝi rajtas min rivali?

'42 Jen elkreskis la unik'! ; Ŝia
blanko – artifik':

'43 La patrin' gravedis kiam, ;
Neĝon nur rigardis ĉiam!

'44 Ne! Nenie sub ĉiel' ; Pli ol
mi estas bel'.

'45 Diru tuj kaj sen mensogo: ;
Estas mi la plej alloga,

'46 La plej bela en la mond'!" ;
Sed denove la respond':

'47 "La princino, estas vero, ;
La plej bela sur la tero".

'48 Kion fari? Ĵetas ŝi ; En
kolero kaj envi'

'49 La spegulon sur la plankon
; Kaj ordonas al Ĉernavka

'50 En densejon de arbar' ;
Kun filino de la car'

'51 Iri kvazaŭ por promeno, ;
Ŝin kunligi per rimeno,

'52 Tie lasi ŝin sub pin', ; Por
ke lupoj manĝu ŝin.

,& Kvara parto:

'53 Kun virino eĉ diablo ;
Lukti estas ne kapabla.

'54 En densejon de arbar' ;
Kun filino de la car'

'55 Ĉambristino sin direktis. ;
Ĉion la princin' konjektis,

'56 Kaj sin turnis en impet' ;
Al Ĉernavka kun la pet':

'57 "Ho, kompatu min
bonkore, ; Lasu vivon! Mi
favore

'58 Rekompencos danke vin, ;
Kiam estos mi reĝin".

'59 Kaj Ĉernavk' al pet' sin
klinis, – ; Al princin' ŝi ja
inklinis, –

'60 Ŝin ne lasis al tortur', ; Ne
kunligis ŝin per ŝnur',

'61 De kruela morto savis ;
Kaj tiele adiaŭis:

'62 "Gardu dia vin favor", – ;
Diris ŝi kaj iris for.

'63 "Nu?! – renkontis ŝin
carino, – ; Kiel fartas la
princino?"

'64 Kaj respondas ŝin
Ĉernavk': ; "Tie, en arbara
faŭk',

'65 Ŝi, per ŝnuro kunligita, ;
Sian morton senevitan

'66 Nun atendas. Raba best' ;
Ŝin formanĝos sen protest".

.....

'67 Kaj la famo ve-malveris: ;
"Carfilino malaperis!"

'68 Ĝemas car' en kora splen'.
; Sed Elizo en ĉagren'

'69 Preĝe al ĉiel' apelis ; Kaj
ĉevalon sian selis, –

'70 Fianĉinon en la vast' ;
Rajdis serĉi sen prokrast'.

,& Kvina parto:

'71 La princino nia kara ; Sola vagis en arbaro

'72 Kaj, vaginte ĝis maten', ;
Vidas domon sur eben'.

'73 Boje hundo ŝin renkontis, ;
Tamen tuj humile hontis –

'74 Svingis voston. Plena ord',
; Sed neniun en la kort',

'75 Vidas ŝi neniun homon. ;
Time ŝi aliris domon;

'76 Sur peronon levis sin, ;
Prenis anson la princin',

'77 Pord' mallaŭte ekĉarniris ;
Kaj en ĉambron ŝi eniris;

'78 En la ĉambr' nenia son', ;
Pura tablo sub ikon',

'79 En angulo forn' kahela, ;
Sur la vand' tapiŝo fela.

'80 Vidas ŝi kun la esper': ; Ne
minacas ŝin danĝer',

'81 Ĉar videble bonaj homoj ;
Loĝas en ĉi tiu domo.

'82 Ekmastrumis ŝi kun gaj', ;
Tuje hejtis fornon kaj

'83 Ĉe ikono de l' Eterna ;
Eklumigis ŝi lucernon,

'84 Kaj kuŝiĝis sur la forn' – ;
Klinis sin pro laca dorm'.

'85 Al tagmanĝo tempo fluas;
En la korto iu bruas, –

'86 Sep bravuloj post moment'
; Venas al apartament'.

'87 La plej aĝa miras: "Dio! ;
Kiel pura estas ĉio!

'88 Dum forestis ni, en dom' ;
Ja mastrumis iu hom'.

'89 Kiu? Ho, vin manifestu ;
Kaj al ni amiko estu:

'90 Se maljuna estas vi, ;
Onklo iĝos vi al ni;

'91 Se junul' rozvanga, frato ;
Estos vi al ni amata;

'92 Kaj se vi maljunulin', ; Do
ni nomos vin patrin';

'93 Se fraŭlino, de hodiaŭ ;
Estu vi fratino nia".

'94 La princin' ĉe tiu vok' ;
Levis sin de sia lok',

'95 Al la mastroj ŝi aliris ; Kun
salut' kaj tiel diris:

'96 "Min pardonu pro vizit' ;
Sen permeso, sen invit".

'97 Fratoj laŭ parol' divenis, ;
Ke princin' al ili venis;

'98 Ili petas ŝin al tabl' ; Kaj
regalas kun afabl',

'99 Vinon en pokal' proponas ;
Kaj eltrinki ĝin admonas;

'100 Sed rifuzas la princin' ;
Eĉ gluteton de la vin' , –

'101 Ŝi konfesis kun domaĝ' ;
Ke lacigis ŝin vojaĝ'.

'102 En mansardon ŝin la
fratoj ; Akompanas delikate,

.....

'103 Kaj sur lito post kurten' ;
Lasis solan ĝis maten'.

,& Sesa parto:

'104 Tag' post tag' sinsekve
fluas, ; La princino ne enuas

.....

'105 Kun sep fratoj en arbar'. ;
Dum okupoj pasis jar':

'106 Fratoj en maten' por ĉaso
; Rajdas kampen por anasoj;

.....

'107 Aŭ por ĵeti en batal' ;
Saracenon de ĉeval';

'108 Aŭ por haki kapon favan
; De tatar' per akra glavo;

'109 La princino hejme dum ;
Sin okupas per mastrum',

'110 Gardas ordon kaj kuiras. ;
Fratojn ŝin ne kontraŭdiras,

.....

'111 Ili ŝin respektas. Nu, ;
Kial venis do enu'?

,& Sepa parto:

'112 Kaj ekamis ĉiuj fratoj ;
La principon delikate.

'113 Foje ĉiuj en maten' ; Ŝian
ĉambron venis. Jen

'114 La pli aĝa diras: "Sciu, ;
Vi – fratin' al ni, kaj ĉiu

'115 el la sepo amas vin, ; Kaj
deziras je edzin'.

'116 Ĉar ne estas ebla tio, ; Vi
pacigu nin pro dio,

'117 Kies laŭ la korinklin' ;
Volas iĝi vi edzin',

'118 Bofratino por aliaj? ; Kia
do respondo via?

'119 Kial vi en la konfuz' ;
Klinis kapon? Ĉu rifuz'?"

'120 "Karaj fratoj, ĉiuj saĝaj ;
Estas vi, kaj plej kuraĝaj,

'121 Mi vin dankas pro l'
honor', ; Pro kareso kaj favor',
.....

'122 Mi vin ĉiujn amas, ŝatas,
; Min propono via flatas, –

'123 Se malveron diras mi, ;
Punu min kruele di';

'124 Sed svatiĝ' – por mi
surprizo, ; Ĉar mi jam al princ'
Elizo

'125 Ĵuris esti fianĉin' ; Kaj
eterne ami lin".

'126 Kaj la sep herooj daŭre ;
Staras mute en bedaŭro.

'127 Fine diras aĝa frat': ; "Nin
pardonu pro la svat',

'128 Pro rifuz' ni certe tristas, ;
Tamen plue ne insistas".

'129 "Mi ne kulpas pri rifuz",
– ; Diras ŝi en la konfuz'.

'130 La sep fratoj eksuspiris ;
Kaj silente sin retiris.

'131 Ree ĉiuj en konsent' ;
Vivas frate, sen pretend'.

,& Oka parto:

- '132 Dume ofte la carino ;
Pensis pri la belulino
- '133 Kun malamo kaj ekscit' ;
Longe kuŝis sub la lit'
- '134 Polvkovrite la spegulo. ;
Fine prenis el angulo
- '135 Ĝin carino pro scivol' ;
Kaj denove en frivol'
- '136 Antaŭ la spegulo dandas ;
Kaj kokete ĝin demandas:
- '137 "Bonsaluton! Nun laŭ
ver' ; Al mi diru kun sincer',
.....
- '138 Ĉu mi estas la plej bela, ;
La plej blanka sub ĉielo?"
- '139 "Vi, – responde sonas
voĉ', – ; Estas bela sen riproĉ';
.....
- '140 En arbaro vivas tamen ;
Izolite kaj senfame,
- '141 En amika frata rond' ; La
plej bela en la mond'"
- '142 La carino ektumultis ;
Kaj Ĉernavkon ekinsultis:
- '143 "Vi, sentaŭga, trompis
min!..." ; Ĉion pentis la
knabin',
- '144 La carin', kolere ruĝa, ;
Vipis ŝin per leda skurĝo
- '145 Kaj decidis en obstin': ;
"Plu ne vivu la princin'"

,& Naŭa parto:

- '146 Atendante fratojn, linon ;
Ŝpinis foje la princino,
- '147 Kaj subite antaŭ pord' ;
Hund' ekbojis en la kort'.
- '148 Ŝi – fenestren: sur
perono, ; Vidas ŝi, per
irbastono
- '149 En terur' defendas sin ;
Kontraŭ hund' almozulin'.
- '150 "He, atendu nur
sekundon, ; Tuj forpelos mi la
hundon,
- '151 Kvietigos ĝin per pan', ;
Kaj regaloj vin per flan'"
- '152 "Belulino, savu, kara, ;
Min de tiu ĉi barbaro!
- '153 Mordas min malica best',
; Ĝi formanĝos min sen rest'!
.....
- '154 Jen hundaĉo furioza!" ;
Ĵus princino kun almozo
- '155 Sur perono montris sin, ;
Ŝin la hundo kun obstin'
- '156 Al almozulin' ne lasas, ;
Proksimiĝi embarasas.
- '157 Furioze en eksalt', ;
Saltas, bojas ĝi sen halt',
- '158 "Kial Falko tiel bestas? ;
Eble ĝi malsata estas?

'159 Kaptu, jen!..." Kaj flugas pan'. ; Panon lerte per la man'
 '160 Kaptis la almozulino. ;
 "Mi vin dankas, belulino,
 '161 Gardu vin je dio ben'. ;
 Pro la pano – kaptu, jen!"
 '162 Al princin' sukplena pomo ; Flugas roza kaj aroma...
 '163 Falko, kvazaŭ en frenez', ; Saltas, bojas en eksces'...
 '164 Sed princin', al hundo spite, ; Kaptis pomon.
 "Apetite
 '165 Manĝu ĝin. Pro via pan' ;
 Mi tre dankas vin, infan'..."
 '166 La almozulino diris, ;
 Riverencis kaj foriris.
 '167 Al princino ĝis la frunt' ;
 Saltas la fidela hund',
 '168 Ekscitite, ĝeme bojas, ;
 Kvazaŭ ĝi averti volas:
 '169 "Ĵetu pomon, ĵetu for!" ;
 Sentas ja la hunda kor'...
 '170 Gladas Falkon ŝi karese ;
 "Kial bojas vi senĉese?
 '171 Kuŝu, Falk'!..." Kun tiu vort' ; Iris domon ŝi el kort',
 '172 Riglis pordon de la domo, ; Sur la tablono metis pomon
 '173 Kaj ekŝpinis, sed la pom' ; Logis ŝin per la arom', –
 '174 Estis freŝa ĝi, sukoza, ;
 Diafana, ore-roza,
 '175 Saturita per miel' ;
 Travidigas semojn ŝel'...
 '176 Pomon post tagmanĝ' intencis ; Manĝi ŝi, ne paciencis –
 '177 Ĝi allogis, tentis ŝin. ; Prenis pomon la princin',
 '178 Al korala buŝo portis, ; Etan pecon ŝi demordis...
 '179 Kaj subite, dio! jen ; Iĝis pala, kaj en sven'
 '180 Ŝi mallevis manojn blankajn, ; Pomon lasis sur la plankon,
 '181 En okuloj – la nebul'; Sub ikonon en angul'
 '182 Ŝi senspire benken falis, ; Morta ombro ŝin vualis.
 '183 Jen revenas post pelĉas' ; Fratoj hejmen kun amas'
 '184 Da akiro plej abunda, ; Kaj renkonten kuras hundo
 '185 Kun freneza laŭta boj'. ; "Nin atendas la malĝoj!" –
 '186 Pensas fratoj kaj rapidas ; En la domon, ahe vidas

'187 Malfeliĉon. Kune falk' ;
Kuras kun rikana faŭk',

;;;

'188 Kun bojad' la pomon
mordas, ; Konvulsioj ĝin
ektordas,

'189 Ĝi mortfalas: je venen' ;
Estis pomo plena. Jen

'190 Antaŭ la fratino morta ;
Staras fratoj nun sen vorto,

'191 Klinis kapojn en angor', ;
En sopiro kaj dolor',

'192 Enterigi tuj intencis, ;
Tamen poste alipensis,

'193 En vizaĝ' serena pac', ;
Ŝajne dormas ŝi pro lac',

'194 Freŝa ŝi sur tablo kuŝas, ;
Mortosignoj ŝin ne tuŝas.

'195 Tri tagnoktoj trenis ŝin – ;
Ne vekigis la princin'.

'196 Fratoj post funebra rito ;
La kadavron senspiritan,

'197 Envolvitan per vual', ; En
la ĉerkon el kristal'

'198 Metis por ripoz' eterna;
Ĉerkon portis en kavernon

'199 Noktomeze en solen', ;
Per fortika gisa ĉen'

'200 Ĝin pendigis al kolonoj, ;
Balustradis ĝin per ŝtonoj.

'201 Antaŭ tombo de l' fratino' ;
Fratoj preĝe klinis sin:

'202 "Dormu vi en ĉerko via, ;
Estingiĝis pro envio

'203 Sur la tero via bel', ; Vin
akceptu la ĉiel';

'204 Ni vin amis kore, frate, ;
Gardis vin por la amato,

'205 Sed vi restis la fraŭlin', ;
Nur la ĉerko brakas vin".

,& Deko parto:

'206 La carin' en sama tago, ;
Certa pri malica ago,

' 207 (Ree diras en frivol': ;)×
.....

'208 "Ĉu mi estas la plej bela,
; La plej blanka sub ĉielo?"
.....

'209 "Vi – responde sonas voĉ'
– ; Estas ĉarma sen riproĉ',

'210 La plej blanka, la plej
bela, ; Pleje rava sub ĉielo".
.....

,& Deko parto:

'211 Sed Eliz' tra tuta land' ;
Rajdas jam de rand' al rand',
.....

'212 Fianĉinon li senĉese ;
Serĉas, tamen sensukcese,

'213 Kaj malĝojas pli kaj pli, ;
Pridemandas homojn li,

'214 Por la helpo ilin vokas, ;
Ili lin nur sole mokas;

'215 Kaj Eliz' sin turnas nun ;
Kun demando al la sun';

'216 "Vi rondiras, suno hela, ;
Tutan jaron en ĉielo,

'217 Frostan vintron al la ter' ;
Vi venigas post somer',

'218 Vidas ĉion rand-al-rando,
; Do respondu al demando,

'219 Fianĉinon serĉas mi, ;
Eble ŝin renkontis vi?"

'220 "Ne, mi vidis ŝin nenie, ;
Eble ŝi jam mortis ie, –

'221 Lin respondis hela sun', –
; Eble mia frato, lun',

'222 Fianĉinon vidis vian, ; Do
demandu fraton mian".

'223 Ĵus alvenis la vesper', ;
Kaj eklumis lun' al ter',

'224 Turnas sin Eliz' juna ;
Kun alvoko al la luno:

- '225 "Luno, luno, mia frat', ;
Orumita kurba spad',
- '226 Helokula, vangeronda, ;
Vi leviĝas super mondo
- '227 Kaj admiras ĉiu stel' ;
Vian marŝon en ĉiel'.
- '228 Ne rifuzu je respondo: ;
Eble ie en la mondo
- '229 La principon vidis vi, – ;
Gefianĉoj estas ni".
- '230 "Ne, – respondis luno
hela, – ; Mi ne vidis vian
belan,
- '231 Mi ja staras hje deĵor' ;
Nur en mia vica hor'.
- '232 Eble dum deĵcor' alia ;
Fianĉino pasis via".
- '233 Princo ĝemas: "Kien
nun?" ; Sed daŭrigas klara
lun':
- '234 "Ĉesu ĝemi en turmento,
– ; Eble ion scias vento,
- '235 Ĝi vin helpas ĉe malĝoj',
; Nun adiaŭ. Do al voj!"
- '236 Jen Elizo kun impeto ;
Turnas sin al vent' kun peto:
.....
- '237 "Vento, vent', potencia
vent', ; Vi en blua firmament'
.....
- '238 Nubamasojn lude pelas, ;
Marajn ondojn vi ŝancelas,
- '239 Vi obeas nur al di', ; Kaj
neniun timas vi.
- '240 Ĉu rifuzos vi respondon?
; Eble ie en la mondo
- '241 La principon vidis vi – ;
Gefianĉoj estas ni".
- '242 Kaj respondas vent'
impeta: ; "Tie, trans river'
kvieta,
- '243 Altas mont' ĉe horizont', ;
Grot' profunda en la mont',
- '244 Tie en la grota halo ;
Pendas ĉerko el kristalo,
- '245 Ĝin subtenas gisa ĉen', ;
Ĉirkaŭ tiu ĉi teren'
- '246 Videblas spur' nenia, ; En
la ĉerk' – princino via".

,& Dekunua parto:

'247 Flugis, blovis pluen vent'.
; Jen Elizo kun lament'

'248 Al dezerta monto iras, ;
Fianĉinon li deziras

'249 Adiaŭi per la kis'. ; Jen
sur vojo de Eliz'

'250 Altas mont' kun nuda
verto, ; Ĉirkaŭ monto – spac'
dezerta,

'251 Faŭkas groto. En sopir' ;
Li rapidas al enir'.

'252 Antaŭ li en grota halo ;
Pendas ĉerko el kristalo,

'253 En la ĉerko – ho destin' –
; Morte kuŝas la princin'.

'254 Frapis li per mano forta ;
Ĉerkon kun princino porta,

'255 Ĉerko krevis, kaj princin'
; reviviĝis, levis sin,

'256 Balancante sin je ĉenoj, ;
Per okuloj miroplenaj

'257 Ekrigardis ĉirkaŭ si: ;
"Kiel longe dormis mi!..."

'258 Kaj subite lin ekvidas... ;
"Ah!..." Kaj ambaŭ plore
ridas.

'259 Li alpremas ŝin al kor' ;
Kaj el groto portas for.

'260 Parolante dum la vojo, ;
Ili iras hejmen ĝojaj.

'261 "Princ' Eliz', – trumpetas
fam', – ; La princinon trovis
jam".

,& Dekdua parto:

'262 Bopatrin' en ĉi momento ;
En spegul' kun memkontento

.....

'263 Sin admiris en frivol' ;
Kaj demandas kun scivol':

'264 "Ĉu mi estas la plej bela,
; La plej blanka sub ĉielo?"

.....

'265 "Vi, – responde sonas
voĉ', – ; Estas bela sen riproĉ',

.....

'266 Sed plej bela sub la suno
; Estas la princino juna!"

'267 La spegulon en koler' ; Ŝi
frakasas je la ter',

'268 Al la pordo ŝi rapidas, ;
Bofilon mire vidas,

'269 Falas sojlen ŝi sen vort' –
; Ŝin subite trafis mort'.

'270 Post la enterig' solena, ;
Post funebra rit' konvena

'271 Kun permeso de la car' ;
Geedziĝis juna par'.

'272 Estis pompa la festeno, ;
Multegasta la kunveno.

'273 Mi lipharojn en pokal' ;
Ankaŭ trempis ĉe la bal'.

& Sekretaj sonetoj:

< Rekante 90 el 169 batoj por strofo, entute 7897 paŝoj dum 100 minutoj. Verkis Peter Peneter (1932), kaŝnomo de Kálmán Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2017) per rekantaĵoj el enkonduko de la sama verko kaj nova melodio.>

(#Melodio:

(i;La /LaLa Tido TiTi MiMi LaaLa;La LaSo SoLa MiRe DoRe
Mi;Mi LaLa MiFa MiRe DoRe Mi;Do MiMi LaLa SoLa MiRe
MiMi i;;Mi LaLa Tido TiTi MiMi LaaLa;La LaSo SoLa MiRe
DoRe Mi;Do ReRe FaFa MiRe DoRe Mi;Mi MiMi LaLa MiRe
DoRe MiMi i;

(#Rekantaĵe: LaLa Tido TiTi MiMi La aLa LaSo SoLa MiRe
MiMi i; LaLa Tido TiTi MiMi LaSo LaMi MiRe DoRe MiMi
i;Do)

DoDo TITI DoRe MiDo TI LA;TI; DoDo TITI DoDo MiDo Re
e;Do DoDo TITI DoRe MiDo TI LA;;TI; DoDo TITI DoDo
MiDo Re e;Do DoDo TITI DoRe MiDo TI LA;TI DoDo MiRe
MiMi SiMi La a;Ti

(#Rekantaĵe: dodo LaLa TiLa So Mi;Do ReRe FaFa MiDo Re
e;Mi LaLa MiMi ReTI Do LA;Do TITI TITI DoRe Mi i;;Do TITI
TITI DoRe Mi i;Mi dodo LaLa TiLa So Mi;Mi dodo LaLa TiLa
So Mi;Do ReRe FaFa MiDo Re e;;Mi LaLa MiMi ReTI Do
LA;Do TITI TITI DoRe Mi i;;Do TITI TITI DoRe Mi i;Mi dodo
LaLa TiLa So Mi;Mi dodo LaLa TiLa So Mi)

)×53)+

(&Strofoj:

'1 En hejma balo, sub la lustr-flamoj, ; Mi vagis sola. Tedis min la bru'. ; Rigardis mi malplaĉe, kun enu' ; Al la gladitaj dandoj, pucaj damoj. ;; Brilegis la juveloj kaj ornamoj, ; La vestoj montris formojn per alglu', ; Dekoltoj estis preskaŭ ĝis genu': ; Aŭkcio de krurkarnoj kaj de mamoj.

(×: **Premu min sigele al la kor', sigele al la brako nuda, ; Ĉar la amo estas forta, kiel mort' kaj kiel tombo, kruda.**)

Sed pudra blanko kaj ŝminkita ĉarmo, ; Femuro, kokso, kruro kaj kalkan', ; Ĉi tiu tuta duonnuda svarmo ;; Min nun devigis nur je mok-rikan'. ; Jes ja. Mi inter multa, multa karno ; Naŭziĝis, kiel la vegetaran'.

(×: **La ardan amon trans ĉemizo ; Mi pentros, Kara, sen mensog'.** ; Kuraĝa estas la devizo ; De mia eta versprolog'. ;; Vestinte sin per pruda tog' ; Poetoj haltas ĉe la kiso. ; Sed ardan amon trans ĉemizo ; Mi pentros, Kara, sen mensog'. ;; La kis' pli dolĉas, ol ĉerizo, ; Pli ebriigas ĝi, ol grog', ; Sed — ĉu ni vivus sen la log' ; Al pli profunda paradizo? ; Jen arda amo trans ĉemizo...)

'2 Nun, mi ekvidis vin! De l' vangoj ĉarmaj ; Al virga brusto kaj al rasa krur' ; Okuloj miaj glitis kun plezur', ; Tra mia koro fluis ondoj varmaj. ;; Subite haltis mi sub sentoj svarmaj, ; Min kvazaŭ tiris al vi sorĉa ŝnur', ; Sed mi admiris vin kun ĉasta pur', ; Ne estis en mi ekdeziroj karnaj.

Jes, ĉaste, sen malpuro de pasio ; Mi vin ornamis per admira kron'... ; Kio okazis do en subkonscio, ;; Ke, ne timante brilon de l' salon', ; Levante kapon sin anoncis io: ; Fripona bub' en mia pantalon'.

'3 Oni prezentis min. "Ho, la poeto!" ; Vi diris, kun ekbrilo de okul', ; Kaj ni sidiĝis flanke en angul', ; Tuj konsentante: "Teda societo." ;; Kaj vi babilis dolĉe, kun rideto, ; La tempo pasis kun rapida rul', ; Kaj mia koro, pro l' kreskanta brul', ; Fajrerojn ŝutis, kiel la raketo.

Mi estis sprita. Trilis via rido, ; Sonore, kiel la arĝenta kord', ; Kaj mia Bubo dume, kun insido, ;; Frapetis sur la pantalona pord' ; Levante ĝin je eta piramido. ; Ĝi evidente celis al rekord'.

'4 Bruegis gaje jam la societo. ; Pro miaj vortoj, pro l' ioma trink' ; Vizaĝon vian per natiura ŝmink' ; Koloris jam facila ebrieto. ;; Kaj dum en dolĉincita malkvieto ; Nin ĉirkaŭbaris kvazaŭ sorĉa ring', ; Jen, sian kapon kun subita sving' ; Ekmovis mia vira amuleto.

Vi ĝuste alrigardis, kaj ekvidis ; Ke sin balancas mia amkompas', ; Kaj forrigardi vane vi rapidis: ;; La lipomordo, arda embaras', ; Okuloj nebulitaj vin perfidis: ; Vi sentis ĝin penetri kun frakas'!

'5 El gramofon' sinkopis, disonancis ; Kaj plandojn tiklis la ĵazbanda bru'. ; "Ni dancu!" Dancis ni kun granda ĝu', ; La lulajn koksojn rave vi balancis. ;; Miksiĝis spir' al spiro dum ni dancis, ; Kaj mi premiĝis en ardanta glu' ; Al viaj sorĉaj pelvo kaj genu'. ; Ebriis mi. La Bub' eĉ plie prancis.

Mi sentis, ke sur via Brust' sin levis ; Du dolĉaj pintoj kun ekscita ŝvel', ; Kaj mia pranca ŝvelo praskaŭ krevis. ;; La koro batis en freneza pel'. ; Mi amis jam, kaj ĝin sigeli devis: ; Sur la kalsono restis la sigel'.

'6 La hejma balo estis jam finita. ; Mi akompanis vin dum hejmenir', ; Kaj antaŭ pordo, ĉe l' adiaŭdir', ; Mankise dankis vin pro l' vort' invita. ;; Ho, dolĉa Morgaŭ! Rava tag' vizita! ; Mi hejmeniris kvazaŭ en delir', ; Duone senkonscie pro l' sopir', ; Al fraŭla ĉambro, al la lit' ermita.

Kaj hejme mi rigardis kaj gratulis ; La Bubon, kaj dum dolĉa rememor' ; Vizio sorĉa antaŭ mi nebulis: ;; En lit' vi interprem' kun langvor' ; Per la femuroj lokon, kiu brulis ; Kaj larmis pro la pafado de Amor'.

'7 La postan tagon iris mi vizite, ; Prezenti min, laŭ etiket-regul', ; Al famili', sed, kvazaŭ somnambul', ; Mi rigardegis sole vin ravite. ;; Vi havis ĝuste gastojn. Kaj subite, ; Jen, ree sidis ni en la angul', ; Kaj mia dekstra man' kun trema brul' ; En vian manon sin alŝtelis glite.

Kaj dum sekrete ĉirkaŭ mia fingro ; Fermiĝis via man' kaj ĝis radik' ; Ĝin ĉirkaŭprem' kvazaŭ arda ringo, ;; Tra nia spino vibras dolĉa pik' ; Pro tiu kuŝ' en humid-varma ingo, ; Pro l' erotike arda simpolik'.

'8 Ho, sopirata horo rendevua ; En maja bosko! Kaj dum la promen' ; En kaŝa loko trema ĉirkaŭpren' ; Kaj longa, longa, longa kis' unua. ;; Kaj kiso dua, tria, kvara, plua! ; Malŝpara dono kaj avida pren'! ; Al mia korpo en duona sven' ; Alprem' sin la dolĉa korpo glua.

Gluiĝis al mi via dolĉa ventro, ; Kaj sub ĝi, kun ekstaza fandiĝem', ; Tra l' vestoj via plej sekreta Centro ;; Bruligis, alpremiĝis ĝis ekstrem'. ; Ekstaze dum ĉi sorĉa korpkoncentro ; Mi helpis vin de poste, per manprem'.

'9 Kaj sub la dolĉa trudo de l' sopiro ; La lipojn vi malfermis kun soif', ; Kaj la malsekon varman de l' gingiv' ; Eksentis mi, ĝuante ĝin sen spiro. ;; Kaj trinkavide, kiel la vampiro, ; La mioldolĉan sukron de l' saliv' ; Mi sorbis, kvazaŭ akvon de la viv', ; Kaj vi, en duonsvena amdeliro

Ekfordis mian lipon ĝis eksango. ; Volupte ĝemis mi, kaj en ebri' ; Penetris vian buŝon mia lango ;; Kaj konvulsie vibras ĝi en vi, ; Dum prancis mia kompatinda Stango ; Kaj tremis, preskaŭ krevis pro l' envi'.

'10 Ho, ravaj tempoj en
printempo pompa ; Sekretaj
vagoj kune en ekstaz'! ; La
punkto estis kis' post ĉiu fraz',
; Parolo nia estis kver'
kolomba. ;; Ni ĝeme ĵuris pri l'
fidel' ĝistomba, ; Ni trinkis
kisojn el senfunda vaz'. ; Foje
forĝesis ni pri l' tempo-pas': ;
Tri horojn daŭris kis'
seninterrompa.

Tri horojn mi vin kisis kaj
ripetis, ; Tri horojn kisis vi sen
sola vort', ; Tri horojn longajn
mia lip' frapetis ;; Sur via lipo
kun obstina fort', ; Frapante
sur la supra pordo, petis ;
Eniron sur malsupra via pord'.
.....

'11 Brakume vi en mia sino
sidis, ; La dolĉajn vangojn
kovris am-purpur', ; Kaj mi
karexis vin ĉe l' svelta krur', ;
Sed mia man' pli supren
ekrapidis, ;; Kaj glitis, glitis,
vane ĝin mi bridis ; Sur la
blanksilka haŭto de l' femur', ;
Kaj vin unue tuŝis ĉe l' velur' ;
Humide arda, kiun ĝi avidis.
.....

Vi rigidiĝis, kaj ekĝemis
mole, ; Kaj spasme premis
min al via kor', ; Kaj paste vi
eklulis vin senvole, ;; Ĝis sub
la fingro-lud', el am-amfor' ;
Sur miajn fingrojn gutis
preskaŭ bole ; Varmega suk':
oleo de Amor'.

'12 Mi iris al vi kun animo
bola ; Por voki vin al nova
kis-agap'. ; Mi sonorigis. Via
dolĉa kap' ; Aperis kun la
blondo aŭreola. ;; Kaj ni
eniris. Kaj vi estis sola! ;
Premiĝis mia kor' sub dolĉa
frap'. ; Ni kisis nin. Mi tiris al
kanap' ; Vin lipsurlipe, kun
perforto mola.

Kaj kuŝe jam, en arda
sinforges', ; Ankoraŭ laste vi
ekĝemis: "Ho ne!" ; Sed mi la
jupon ĉifis en frenez', ;; Kaj
jen albrilis min marmorkolone
; La du femuroj kun la ombra
mez' ; Kara! Vi min atendis
senkalsone!

'13 Kaj nun mi klinis min sur
vin avide; ; Por kroĉi nin per
arda, karna lig', ; Por rompi tra
l' envia lasta dig', ; Al la batal'
alarmis mi konfide. ;; Fripona
Bub'! Ĝi trompis min perfide:
; Malice ŝajnis moki pri l'
instig', ; Kaj ŝrumpis aĉe,
kvazaŭ seka fig', ; La stultan
kapon klinis invalide.

Mi konsterniĝis. Ĝin agitis
mane. ; Kun ŝvita fortostreĉ'
kaj ligo-mord' ; Mi ĝin animis.
Vane, vane, vane. ;; Jes,
malgraŭ knedo kaj kolera tord'
; Ĝi kuŝis mole, kurbe, aĉe,
flane: ; Senpova Hanibalo
antaŭ pord'.

'14 Kelkajn sensencajn vortojn
mi balbutis ; Kaj fuĝis for kaj
kuris sur la strat', ; Kaj kvazaŭ
post insulta vangobat', ; Min
nedirebla honto persekutis. ;;
Sur mia frunto frosta ŝvito
gutis, ; La lang' gluiĝis seke al
palat', ; Eniris mi en
kompatinda stat' ; Drinkejon
kaj avide vinon glutis.

Kaj post sencela, longa vag'
traurbe, ; Mi hejmeniris kaj
sur la kanap' ; Esploris mi la
Bubon, kiu kurbe ;; Fiaskis.
Kaj jen, ĝia stulta kap' ; Nun
levis sin, nun ŝvelis ĝi
kukurbe. ; Fi, mi ĝin punis per
kolera frap'.

'15 La sekvan tagon tintis
telefono. ; Mi levis ĝin kun
tedo, sub deprim'. ; Jen, via
voĉo! Tremis la esprim' ; De
la kompatato en la dolĉa sono. ;;
Kaj mia voĉ' atestis pri
malbono, ; Ĉar "Tuj mi
venos!" kriis vi kun tim'. ; Ho,
kia vibro kuris tra l' anim', ; Eĉ
mia Bub' stariĝis sen admono.
.....

Kaj tiam mi kolere kaptis ĝin,
; Kaj atentigis, kvazaŭ
grumbla mastro ; Serviston
sian pri la disciplin': ;; Se vi
ne staros kiel la pilastro, ; Se
vi rifuzos servi kun obstin', ;
Fripona Bub', mi punos vin
per kastro!

'16 Kaj venis vi kaj kun
kompreno takta ; Ridetis vi,
ho, admirinda saĝ'! ; Trafluis
miajn membrojn la kuraĝ' ;
Neniam estis ŝvelo pli
kompakta. ;; Nun, nun, rapide!
Inter blanko lakta ; Jam ombre
silkis la sopir-pejzaĝ' ; Kaj
vokis, vokis por plezur-vojaĝ'
; Tra la misteroj de la grot'
barakta.

Rompiĝis pordo! Post dolora
ĝem' ; Kiel pafita eta korpo
birda ; Vi kuŝis, svene, kun
tutkorpa trem'! ;; Ho kara,
kara! Ho viktimo virga! ; La
Bubo brulis en la ĉirkaŭprem',
; Kontuze pro la strikta vojo
smirga.

'17 Nur kelkaj movoj — la
volupto plenis. ; Mi rigidiĝis
kun ekstaza trem'. ; Dum vin
inundis mia varma sem', ; Sur
via svena korp' mi preskaŭ
svenis. ;; La sangan glavon
milde mi reprenis, ; La
vundon kisis mi kun karesem',
; Kaj vin karesis, ĝis kun laca
ĝem' ; Via konscio ree al vi
venis.

Nun vian manon kisis mi kun
danka ; Kortuŝo pri la oferita
riĉ' ; Kaj mi rigardis al la tolo
sanga ;; Kiel la idolano al
fetiĉ': ; Ho, jen standardo
sankta, ruĝa-blanka, ;
Standard' de mia gloro kaj
feliĉ'!

'18 Monatoj de eterna ebrieto!
; Soif' eterna kaj eterna sorb'. ;
Ni sentis nur en karna kroĉ' de
korp' ; La vivon, krome estis
nur vegeto. ;; Kiel altiras feron
la magneto, ; Tiel altiris al la
fea bord' ; Kompason mian via
arda Nord' ; Por la plej dolĉa
speco de dueto.

La dolĉan fortikaĵon per sieĝo
; Mi prenis kampe, inter
timian', ; Sur fojno, nuda tero
kaj en neĝo, ;; Malantaŭ pordo
kaj post la ekran', ; En lito kaj
sur sofo kaj sur seĝo, ; Kaj sur
tapiŝo sub fortepian'.

'19 Jam for la rob'! Sed pri l'
ĉemizo, Kara, ; Mi helpas vin.
Sed malrapide nur! ; Ke mi
karesu dume tra l' velur' ;
Malkovriĝinta, diafane klara.
;; De l' marmorŝultroj blanko
senkompara ; Ekbrilas nun en
senmakula pur' ; Kaj sekvas,
plu, sub milda hontpurpur' ;
La brusto. Nun, nun, sekvas
rozo para

Sur neĝmontetoj. Kaj la dolĉa
valo. ; Ho, plu, ho plu! Sub
sento de mistik' ; Ektremas mi,
ĉar jen, el la vualo ; ;
Malkovras sin, kaj kiel la
kalik' ; De Gral' al la scianta
Parsifalo ; Aperas via sorĉa
umbilik'.

'20 Post kis' ĉielplezura,
inferflama, ; Ekmigras mia lip'
laŭ sorĉa rit' ; ; Kaj fajrajn
punktojn laŭ la arda glit' ;
Postlasas ĝi ur via kol'
balzama. ; Ascendas ĝi al
milda monto mama, ; Sur
cico-rozoj haltas ĉe l' zenit' ;
Kaj poste ĝi, kun morda appetit'
; Algluas sin por suĉo
voluptama.

Ĝi poste glitas plu kun tikla
vibro, ; Tra l' dolĉa ventro, sur
silkhaŭta blank', ; Nun haltas,
kaj kun trem' en ĉiu fibro, ; ;
Subite ĵetas sin, kiel lavang', ;
En dolĉan pordon' de l'
ĉielvestiblo. ; Kaj ne la lip'
jam kisas, sed la lang'!

'21 Dum inter viajn du
femurojn; Kara, ; Premiĝas
mia kap' kun arda bor', ; Kaj
mia lango vibras. kun fervor' ;
En via servo plej familiara, ; ;
Min ravas dolĉa, milde fiŝ-
ovara ; Parfumo, kaj el via
am-amfor' ; Nektaro varma
verŝas sin jam for ; Kun freŝa
gusto de la salo mara.

Ho, praodor' pragusto! Ho,
nebula ; Memoro senkonscia,
kiam nin ; Balancis mole la
pra-mano lula ; ; De l' fet-fluid'
en korpo de l' patrin'! ; Ho,
min transpremi tra la vojo
brula, ; Sub via koro, luli min
sen fin'!

'22 Ho ne koleru, ke mi vin
privensas ; En la baraktoj de l'
volupta sven', ; Ĝi estas sankta
don' kaj sankta pren', ; La vera
am' neniam ja perversas. ;; Kaj
ĝiaj vojoj kiel ajn diversas, ;
Ĝi estas la plej alta tera ben', ;
Se ĝi nin portas en torenta
tren', ; Ja ĉiujn homrezonojn
ĝi renversas.

Ni amas nin kun amo arde pia,
; Do per nenia ago misas ni, ;
Kaj por mi sanktas ĉiu parto
via, ;; Kaj ĉiujn kun adoro
kisas mi, ; Kaj por mi estas
vazo ambrozia ; La lok', per
kiu, Kara, pisas vi.

'23 Dum kisoluda, nuda, kuna
kuŝo, ; jen, mia Bub' la kapon
el kapuĉ' ; elŝovis kaj per
pentekosta ruĝ' ; vin loge
tentis por karesa tuŝo. ;; Kaj
treme, kvazaŭ pro mistera
puŝo, ; el kies pov' ne estas plu
rifuĝ', ; vi kaptis ĝin, kaj per
soifa suĉ', ; avidis ĝin la
konvulsia buŝo.

Sed tamen, de la sopirata
sorbo ; retenis vin la honto pri
l' profan', ; vi sole tenis ĝin,
kaj en absorbo ;; rigardis al la
rubenruĝa glan', ; kaj tronis vi,
reĝin' de mia korpo, ; kaj vi la
sceptron tenis en la man'.

'24 Amata! Venu al la pastro! ;
Ni iĝu jam laŭleĝa par'! ; Tro
longa estis la prokrasto, ;
Amata! Venu al altar'! ;; Pri
tiu ĉi morala plastro ; vi min
ne petis, mia kar', ; sed tamen,
venu al la pastro, ; ni iĝu jam
laŭleĝa par'.

Ne volas resti nura gasto ; la
Bub' en via buduar', ; ĝi volas
pri l' repertuar' ; plezuri hejme,
kiel mastro... ;(; Amata! Venu
al la pastro!)×

'25 Nin pastro benis ĉe l' altaro
ĉefa. ; Jam niajn manojn ligis
sankta maŝ'. ; Ni iris hejmen
kaj post nia paŝ' ; flugile
ŝvebis la feliĉo reva. ;; Kaj ni
de nun el dolĉa pom' de Eva ;
ne devos manĝi peke, kaj en
kaŝ', ; kaj kio ĝis nun estis
malpiaĵ', ; de nun jam estos
sankta tasko deva.

Ho, hejmen, hejmen, kuŝi
kune, nude, ; manĝegi el la
permesita pom'! ; Ho, kiel sin
balancis jam prelude, ;;
ĝojante, mia obeema Gnom': ;
de nun ĝi sin ne devos vesti
prude, ; ĝi povos fine fiki sen
kondom'!

'26 Benata nokto! Arda nokto
nupta! ; Komforta kuŝo en
duobla sol'! ; Senĝena, longa,
longa am-petol' ; ĝis spino-
vibro, ĝemo, kri' abrupta! ;;
Tordiĝo arda en barakt'
volupta ; fandiĝo en ekstaza
karambol'! ; En vin, en vin,
kaj el vi al la tol' ; inunde fluis
mia sem' erupta!

Niaj animoj ardis, korpoj
brulis ; kaj vane ŝprucis la
estinga flu' ; ĉar niaj korpoj
ĉiam pli postulis ; pelante nin
al ĉiam nova glu' ; Kiom da
fojoj? Kiu ja kalkulis? ; Du,
tri, kvin, ses, ok, dek kaj tiel
plu... ..

'27 Matenkrepuske, sur la lit'
komuna ; vekigis vi el
amlangvora sven' ; kaj per
singarde malrapida tren' ; vin
liberigis el la ĉen' brakuma. ;;
Sed mi vekigis, kaj en
duonluma ; ĉambro spionis
ruze pri la scen' ; dum ramp'
albrilis min en plena plen' ; la
dolĉa pugo, kvazaŭ sfero luna.
.....

Kaj nun, kuŝante ruze en
embusko ; pejzaĝon dolĉan
vidis mi kun ĝu' ; ĉe l' pala
lumo de l' matenkrepusko, ;;
kie subite kun susura bru' ;
ekfontis kaj el silke mola
musko ; torente ŝprucis
rivereta flu'.

'28 Fieras vi, ke estas vi
virino, ; kaj estas vi fier' de via
seks' ; virin' en ĉiu ago kaj
refleks' ; en milda ĉarmo,
fajra am-rutino. ;; Malplaĉas
vin nur la virin-destino, ; ke
vin devigas la Natur-kodeks' ;
je humiliga, kaŭra korpo-fleks'
; anstataŭ danda staro, dum
urino.

Ne plendu! Prenu mian tubon,
jen ĝi! ; Pisigu min, imagu
pisi mem! ; Kaj vin konsolu,
se vi pisas sen ĝi, ;; ke, se
ornamus sama vir-emblem' ;
korpeton vian, ja ne povus en
ĝi ; penetri mia edza Tantiem'!
.....

'29 Sed ne, ĉi diro estas ja
erara. ; Mi povus ankaŭ tiel
bori vin, ; eĉ viro kun
samseksa aminklin' ; ja trovas
ingon por la glavo stara. ;; Vi
ankaŭ havas tian ingon, Kara,
; kaj estas viroj, kies
ĝojkulmin' ; ne estas ĝusta bor'
de l' amatin', ; sed vojeraro al
la tru' najbara.

Sed tiu truo, kvankam tru'
malvasta, ; min ne tro tentas
por plezura bor', ; kaj estus
vere jam rimedo lasta ;; ĝin
uzi en la servo de Amor', vĉar
ĝia ringo estas ja elasta, ; sed
tamen — la enhav', kaj la
odor'!

'30 Kvankam, mi diras al vi en sekreto: ; tabuo ne ekzistas por la am'. ; Ĝi ĉirkaŭkisas vin ja per la flam' ; de ardaĵ sentoj eĉ sur la klozeto. ;; Konfesas mi, ke tra l' ŝlosiltrueto ; mi ŝtele ofte vin rigardis jam, ; plezuri pri la rara panoram', ; kiam vi sidas sur intima breto. Jen sidis vi dum kovo idilia, ; la kapon apogante per la brak', ; martir-transcende vizaĝeto via ;; tordiĝis, ĝis eksonis mola krak', ; kaj kiel laodoro akacia ; filtriĝis la odor' de via kak'.
.....

'31 Memoru! Iam kise kaj brakume ; mi blovis mian spiron kun suspir' ; en vian pulmon. Kaj la arda spir' ; penetris vin kaj vi ekstazis dume. ;; Kaj poste spiris vi en min parfume, ; kaj plu ni provis, provis. En delir' ; plezuris ni pri l' arda eliksir' ; kaj puraere kaj cigaredfume.
.....

Ho venu, Kara! Per ĉi kis' aera ; ni ludu, kiel fianĉin', fianĉ'! ; Sed ve, ne venas la plezur' transtera ;; kaj la ekstazo. Bedaŭrinda ŝanĝ'! ; Jam ĉi amnutro estas tro etera, ; ni kutimiĝis al pli grasa manĝ'.
.....

'32 Okazis foje al vi, mia Kara, ; ke ĉe l' kulmina punkto de l' plezur' ; eksplodo eta sonis kun murmur', ; aŭdebla ankaŭ per la senso flara. ;; Necesus por ĉi son' familiara, ; sonanta jen en molo, jen en dur', ; agrabla vorto, ĉar ekzistas nur ; la "furzo", sed ĝi estas tro vulgara.

Eĉ se koleros la Akademi', ; mi kreos novan vorton por ĉi bruoj, ; kaj, ĉar ne estas ĝi soprana kri', ;; sed bariton', aŭ bas', laŭ la menuo, ; mi onomatopee baptos ĝin ; facile, lude kaj petole: puo.
.....

'33 Malbela estas la obscena vorto, ; kaj ne plezuras mi pri ĝia ĉas', ; kaj vere, min eĉ kaptas embaras', ; se iu uzas ĝin el aĉa sporto. ;; En ili tamen estas praa forto, ; kaj ofte de mi glitis tia fraz' ; el buŝo, por dorloti en ekstaz' ; vin per la pleja streĉo de risorto.

Kaj tiam ĝi ne estis vorto kraĉa; en sankta fajro de la erotik' ; fandiĝas oro eĉ el koto aĉa. ;; Kaj same iĝos kanto kaj muzik' ; en via buŝo kaj kun ĉarmo plaĉa ; ektrilos al mi eĉ la vorto: fik'.

'34 Petrarca kun sopiro
senkonsola, ; Dante admire kaj
Camões kun ĝem', ; Spenser
fesonĝe, Ronsard kun logem' ;
sonoris per soneto dolĉparola.
;; Kaj multaj, multaj, kun
flutsono mola ; kunplektis
dekkvar versojn je poem', ;
sed — nur flankumis ĉirkaŭ l'
vera tem', ; kiel la kato ĉirkaŭ
l' kaĉo bola.

La versoj kantis pri la am'
spirita. ; Sed se l' virinanim'
per rava ŝel' ; de varma korp'
ne estus envolvita, ;; se ĉe la
zon' finiĝus la anĝel', ; ĉu
kantoj sonus? Ne! La sekva,
spita ; sonet' parolos pri la
vera cel':

'35 Por la unua, dolĉa foj':
deflori, ; kaj poste: nupti,
karnon miksi, trui, ; seksumi,
kaj koiti, kaj geĝui, ; kopuli,
kohabiti kaj amori. ;; Enpafi,
.ŝtopi, vosti, grotesplori, ;
palisi, kaj bambui, kaj geglui,
; kunkuŝi, kaj interne intervjui,
; bombardi sube, mini, lanci,
bori.

Kaj broson brosi, glavon
karnan ingi, ; buteron kirli,
sondi, piŝti, piki, ; kamenbalai,
inan ingon klingi, ;; surpingli,
karnon planti, truon flicki, ; la
brulon per la akvotub' estingi,
; tranajli, spili, ŝargi, farĉi,
fiki.

'36 "Oni ĝin faras, sed ne
priparolas" ; la franco diras pri
la amsekret'. ; Alie: ne deklaru
per trumpet', ; kiel vi en la lito
kambolas. ;; Jes, certe, jes
ja, ankaŭ mi ne volas ; edife
diri en la societ', ; kiel artlerte
via amringet' ; aperte-ferme
kun la Bub' petolas.

Sed amlangvore, nokte, en
mallumo, ; kiam vi kaŝas
vangojn por apog' ; al mia
brust' honteme dum brakumo,
;; ja estas rara ravo kaj allog' ;
en tio, se memore, por
resumo, ; eksonas nia dolĉa
dialog':

'37 "Mi amas vin dum
rapidspira tremo, ; kiam la
Lanc' kun arta artifik' ; vin
boras, en rapidripeta pik', ; nur
per la pint', el ruza ekscitemo.
;; Mi amas vin dum la
profunda ĝemo, ; kiam la
Lanc' subite ĝis radik' ;
mergiĝas, preskaŭ ĝis la
umbilik' ; penetras vin kun
murdisstreĉa premo.

Sed pleje, kiam kun volupta
krevo ; ekŝprucas en vin mia
arda font', ; kaj ĉe l' kulmino
de l' plezurricevo ;; senspire
pro l' animtrabora sond', ; vi,
kun subita, spasma pugolevo ;
ekrigidiĝas en ekstaza pont'."
.....

'38 "Mi amas vin dum dolĉa
amandorloto, ; kiam, ho kiel
diri?... la palis' ; glitadas
longe, kun karesa kis', ; en la
humida pord' de mia Groto. ;;
Mi amas vin sub sorĉo de
hipnoto, ; kiam ĝi fine, fine,
kun surpriz', ; kaj flugigante
ĝis la Paradiz', ; penetras min,
dronante ĝis la skroto.

Sed pleje, kiam via sorĉa
semo ; inundas min per sia
sankta suk', ; kaj vi, en la
ekzalta penetremo, ;; por kiel
eble plej profunda plug', ;
ekstaze kaj kun konvulsia
premo ; min kaptas mane ĉe la
spasma pug'."

'39 Numero dolĉa: 69. Genuas
; mi super vi, la kapo ĉe l'
ingven', ; kisinte longe ĝin,
per langpromen' ; tiklante,
brulajn striojn mi tatuas ;;
interne de l' femuroj. Nun mi
gluas ; la langon al la dig': per
vibra tren' ; mi ĝin kondukas
supren, sur marĝen' ; Edena,
kaj, dum vin volupto skuas,
.....

en mezan mezon mi ĝin
mergas drone, ; por leke ludi
kun la eta ĉan', ; kiu nun —
mia lango sentas bone — ;;
ekŝvelas, kiel la Ezopa ran', ;
kaj dum la pligrandiĝo,
fanfarone ; imagas sin
kompleta virorgan'.

'40 Kapuĉon mian dume mano
lula ; apertas-fermas kun
karesa tuŝ', ; kaj nun, nun
glitas la humida pluŝ' ; de via
lango, kun vibrado brula, ;;
dolĉtikle tra la haŭto retikula, ;
ke l' du globetoj prancas el la
kuŝ', ; kaj nun ascendas la
langanta buŝ' ; ĝis glan' kaj
lekas ĝin kun glit' cirkula.

Kaj nun ĝi kaptas ĝin kun
milda mordo, ; kaj suĉas jam
la arda liporing'. ; Ho, morti
de plezur'! Kun korpotordo ;;
mi levas, ĵetas min en salta
sving'. ; Kaj — ĉio estas jam
en bona ordo: ; la buŝ' sur
buŝo, kaj la glav' en ing'.

'41 Vi ludas viran rolon kun
plezuro, ; rajdante min kun
arta kokso-lul'; ; ho, rara ravo
estas por okul' ; la tigre svelta
korpo el eburo! ;; La dolĉaj
mamoj ŝvelas de maturo, ; mi
suĉas ilin kun soifa brul', ; sed
— kiam mi vin vid ; tra nebul'
; ekrigidiĝi: kaptas min teruro.
.....

La ĝemo ŝajnas nun martir-
ĝemad', ; la suk' volupta
kvazaŭ sango pura; ; ho, jes,
fantomas min markiz' de
Sade! ;; Mi fantazias en
volupt' obskura, ; ke kuŝas vi
sur eŝafod-estrad', ; mortante
pro la palisum' tortura...

'42 En lit' vi bubviziton ne permesis, ; rezigne flustris: "La monata sang'". ; Sed malkvietis spite mia Stang', ; vi ĝin karesis mole. Sed ne ĉesis ;; la ŝvelo, kompreneble, eĉ, impresis ; jam obeliske. Nun kun brula vang', ; vi proksimiĝis al ĝi kaj per lang' ; kaj per la lipoj vi ĝin ekkaresis.

Kaj — nun eksuĉis vi entuziasme. ; Ho, dolĉturmenta vibro en la nuk'! ; Volupto torda, morda! Dum orgasme ;; en vian buŝon ŝprucis arda suk': ; barakte, ĝeme, senkonscie, spasme ; mi mordis vin je l' alabastra pug'!

'43 "Mallerte la volupton en avido ; ne rapidigu kun perforta hast', ; ellogu longe, longe kun prokrast'!" ; instruas en la Ama Art' Ovido. ;; Li pravas. Faru ni laŭ lia gvido. ; Ne estu do senpacienca gast' ; la Bub', ne agu kun impeta drast', ; sed kun ripozoj kaj kun malrapido.

Ligite per Himena karnrubando, ; ni trinku longe, kun po-guta sorb', ; la sorĉan sukon de l' ĉiela frando. ;; Ke l' propraj korpoj dronu en absorb', ; senfine daŭru ĉi intima fando, ; senfine vivu ĉi dudorsa korp'!

'44 Kaj sidis vi por dolĉa amadanco ; en plena pomp' de l' alabastra nud' ; en sino, brustĉebruste. Sorĉa trud' ; devigis nin por lula korpbalanco. ;; Kaj ĉe l' reklin' penetris vin la Lanco, ; ĉe l' antaŭklin' elglitis. Rava lud'! ; Kaj ni ekzercis en fervora stud' ; arton, donitan de hazarda ŝanco.

Sed nun, ĉe l' pug' mi kaptis vin kaj salte ; leviĝis, kaj kun via dolĉa pez', ; kiun penetris mia Najlo alte, ;; ekiris mi, ĝin portis en frenez', ; ĝis falis ni, kaj sur tapiŝ' ekzalte ; ni ekbaraktis en la ĉambromez'.

'45 Deposte eĉ, dum kaŭro
surgenua, ; penetris mi al via
varma nest', ; kiel la koko, kun
rigida krest', ; kokinon kokas
en mateno frua. ;; Kaj havas la
kopulo ĉi situa ; malbelan
nomon: manier' de best'. ; Ĝi
tamen estis por mi rava fest', ;
mistika, sorĉa, alta, animskua.
.....

Dum ni fandiĝis arda
amalgam', ; ebrie pro l' plezur'
superlativa ; mi fantaziis pri
transtera am': ;; ke vi nun, kiel
la hindin' naiva, ; vizaĝaltere
preĝas al Lingam', ; kaj
nevideble vin penetras Ŝiva.
.....

'46 Se la sopiro niajn korpojn
spronis, ; nenio povis esti por
ni bar'. ; Sur pluva kamp', en
subombrela star', ; la Bubon
mi per via ringo zonis. ;; Kaj
kio eble ĉion kroman kronis, ;
kiel plezurvojaĝa nupta par' ;
ni gluis nin eĉ naĝe en la mar':
; dum la ekstaz' apenaŭ ni ne
dronis.

Sidante trajnon kaj
aŭtomobilon, ; banante nin en
kuvo kaj river', ; ni de l'
volupto faris sorĉan spilon, ;;
ni faris ĝin sur akvo kaj sur
ter' — ; domaĝe, ke ne havis
ni flugilon
por fari ĝin libele, en aer'!

'47 Hejmenirante pordon mi
malfermis. ; Jen, sidis kaj en
pensoj dronis vi, ; distritan,
revan kison donis vi, ; en la
mieno plor' kaj rid' alternis. ;;
Vin mildperforte sur kanap' mi
sternis, ; la trajtojn longe
prispionis mi. ; Vi diris:
"Paĉjo!". Nun rekonis mi, ; ke
mia sem' sub via kor'
ekĝermis.

Ho, mi vin kisis, kisis sur
kanap', ; mi vin alpremis en
brakumo muta, ; kaj jen — la
Bub' englitis! Ĝia kap' ;;
baraktis en vi kun ekbat'
saluta. ; La ĝerma id', pro l'
dura dorsofrap', ; tre certe
grumblis pri la patro bruta,

'48 Sed ne koleru, se mi al vi diros: ; mi same grumblas pri la ĝerma id'. ; La vojon, kiun ĝis nun sen divid' ; mi havis, ĝi per plumpa kap' trauros. ;; La sorĉajn faltojn glataj ĝi distiros, ; la striktajn murojn streĉos ĝi sen brid', ; kaj — kiu min ensorbis kun avid' — ; la karan ringon eble eĉ disŝiros.

Kaj estos via ĝojo kaj ornamo, ; vin ŝarĝos per prizorgo kaj okup', ; posedos dolĉan frukton de la mamu ; ĉi viva, plora-pisa-kaka pup'. ; Al ĝi jam apartenos via amo, ; ni restos orfaj: mi kaj mia Bub'.

'49 Eble milfoje sentis ni sangbolon, ; dum en ardglua kuŝ' apudis ni, ; milfoje al la korpoj trudis ni: ; adori per ofer' la am-Idolon. ;; Kaj ĉiun ardan, artan am-petolon ; senlace, amdonace ludis ni, ; fervore provis kaj elstudis ni ; en ĉiu poz' la tutan aman skolon.

Sed ĉiam kun la sama intensiv' ; nin la momento de l' Ekstaz' perfortas, ; kaj kiam per nerezistebla driv' ;; nin flamrivero de Volupto portas, ; dum tiu ĉi centobliĝinta viv' ; stertore ni ekĝemas: "Ve, mi mortas!"

'50 "Mi mortas!" Jes, ni mortas. Ho mistero! ; En frosta solo de la homa sort' ; sopiras ni je tiu sava mort', ; ĉi morton serĉas ni en malespero. ;; La homa korp', la dissplitita ero, ; en ŝira treno de potenca Fort' ; obeas al la ordonema vort' ; de l' frata paro: Morto kaj Genero.

El orfa solo de l' individu' ; ni serĉas nin, ke save ni komunu, ; ni kunfrapiĝas en ardanta glu', ;; ke ni ekbrule kaj forbrule kunu, ; kaj el la cindroj de l' mortema Du ; fenikse levu sin la sankta Unu!

'51 Sensenca estus de vi la ĵaluzo, ; vi vere min ofendus per la dub', ; Por mia sento estus ja inkub' ; eĉ songe la adulta am-amuzo. ;; Kaj kiel Goethe volis por misuzo ; devigi sian "Majstron", sed la Bub' ; rifuzis servi, kaj li skribas sub ; la versoj rakontantaj pri l' rifuzo:

"Potenca estas Dev', se l' mondo tentas, ; sed nur la Am' triumfas super ŝlim'" — ; kion ĉi versoj ĝis nun prisilentas, ;; nun eksonoru, kiel sankta rim': ; la korp' en korpo sole naŭzon sentas, ; se mankas la anim' al la anim'.

'52 Animon vian kisas mi en
pia ; adoro kaj en idilia cârm',
; kaj en la milda kaj feliça
larm' ; pri la enkorpa animeto
tria. ;; Sed pri çi tio kantu
kant' alia; çi tiu kantis pri la
kroça karn' ; anten' mistera,
kies sorça varm' ; nimon mian
ligas al la via.

L' animoj, kiuj sole kisojn
sendas ; trans korpajn murojn,
kiel la kaptit' ; se tra l' envia
muro breçon fendas ;; Martelo
de la Am' kun sankta spit' ;
sin trovas kaj sin fandas kaj
flugpendas ; en sino de
mistera Pra-spirit'!

'53 Jen la sonetoj! Sovaĝruĝa
ciklo ; por vi, por mi. Trinkajo
de Sopir'. ; Kirlita, kiel sorça
eliksir' ; en via arda kaj
balzama Tiglo. ;; Ĝi estu por
ni dum junaĝa viglo ; instiga,
çiam freŝa am—inspir' ; dum
maljunaĝo — dolçmemora
mir' ; kelkfoje eble eç resorça
tiklo.

Kaj kiam sube kuŝos ni
senkante, ; kaj sen la donoj de
l' diin' de Cipro, ; ĝin legos
juna paro, ekstremante ;; de ĝia
arda, eltranstomba vibro, ; kaj,
ekbrulinte, laŭ la vers' de
Dante, ; "Çi tage jam ne legos
plu de l' Libro".